
# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

N-ro 45 (oka jaro) Decembro 1931

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo : BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

ENHAVO : La Internacia Labora Organizaĵo de la Ligo de Nacioj. — La Altaj Oficistoj de la Internacia Labor-Oficejo. — Listo de la Internaciaj Konvencioj kaj de la Landoj kiuj ratifis ilin.

# La Internacia Labora organizaĵo de la Ligo de Nacioj



La ideo pri internacia reguligo de la laboro estas preskaŭ tiel malnova kiel laborleĝdono mem. Estas ja evidente ke, pro ekzistado de internacia industria konkurado, konvenas, ke la plibonigo de laborkondiĉoj fariĝu laŭeble egalpaŝe en la diversaj landoj. Fakte, la movado por internaciaj kontraktoj protektantaj al laboristaron komencis per propono de Robert Owen al Kongreso en Aachen en 1818, kaj daŭris per la klopodoj de sociaj reformemuloj kaj organizitaj laboristoj ĝis la komenco de la mondmilito. Eĉ du interŝtataj konferencoj okazis. Ĉiuj tiuj penadoj rezultigis nur du konvenciojn, unu pri malpermeso de blanka fosforo en fabrikado de alumetoj kaj unu pri nokta laboro de virinoj, konfirmitajn de dek registaroj, kaj la fondon de Internacia Asocio por la leĝa protekto de la laboro.

La konvinko naskiĝis kaj disvastiĝis ĉe la partianoj de socia reformo, ke la kaŭzo de tiu malrapida progreso estas la manko de taŭga organizo, kaj multaj el tiuj partianoj, kaj precipe la direktantoj de la laborista movado, decidis profiti la traktadojn, kiuj sekvos la finon de la milito, por forigi tiun mankaĵon. Sub la influo de tiu decido, la Konferenco en Parizo nomis Komisionon pri Internacia Labora Leĝdono, el kies diskutadoj rezultis la Parto XIII de la Kontrakto de Versailles, kaj la respondaj partoj de la ceteraj packontraktoj.

La Parto XIII komencas jene : « Konsiderante ke la Ligo de Nacioj celas la starigon de universala paco, kaj ke tiu paco povas esti starigata nur sur la bazo de socia justeco,

Kaj konsiderante ke ekzistas kondiĉoj de laboro entenantaj por granda nombro da homoj maljustecon, mizeron kaj mankojn tiajn ke la malkontenteco tiel produktita minacas la pacon kaj konkordon de la mondo ; kaj konsiderante ke urĝas plibonigi tiujn kondiĉojn : ekzemple, per la reguligo de laborhoroj, starigante maksimumajn labortagon kaj laborsemajnon ; la reguligo de la labormerkato, la forigo de senlaboreco ; la certigo de salajro sufiĉa por vivsubtenado ; la protekto de la laboristo kontraŭ malsanoj kaj akcidentoj rezultaj el lia laboro ; la protekto de infanoj, gejunuloj kaj virinoj ; pensioj okaze de maljuneco kaj invalideco ; la protekto de la interesoj de laboristoj laborantaj en fremdaj landoj ; la akcepto de la principo de libereco je asociado, la organizo de profesia kaj teknika instruado, kaj aliaj rimedoj ;

Konsiderante ankaŭ ke la neakcepto ĉe iu ajn nacio de laborkondiĉoj vere homaj malhelpas la klopodojn de aliaj nacioj dezirantaj plibonigi la kondiĉojn en iliaj propraj landoj ;

La Altaj Kontraktantoj, inspirataj de sentoj de justeco kaj humaneco kaj ankaŭ de la deziro certigi la daŭran pacon de la mondo, interkonsentas la jenon :

Estas fondata daŭra organizaĵo por realigi la celojn difinitajn en la antaŭparolo.

La originaj Membroj de la Ligo de Nacioj estos la originaj Membroj de tiu organizaĵo, kaj estonte membreco de la Ligo de Nacioj kunportos ankaŭ membrecon de la dirita organizaĵo.

La daŭra organizaĵo konsistos el :

1. Ĝenerala Konferenco de Reprezentantoj de la Membroj, kaj

2. Internacia Labora Oficejo.

La Ĝenerala Konferenco devas kunveni almenaŭ unufoje ĉiujare. Ĝi konsistas el kvar reprezentantoj de ĉiu ŝtatmembro : du registaraj delegitoj, unu mastra kaj unu laborista. La neregistaraj delegitoj devas esti elektataj konsente kun la organizaĵoj plej reprezentaj de la mastroj kaj laboristoj en la respektivaj landoj. La delegitoj havas egalan voĉdonpovon ; ili voĉdonas individue kaj ne laŭŝtate. Ĉiu delegito povas esti akompanata de teknikaj konsilantoj.

La Konferenco povas doni al siaj decidoj la formon aŭ de projekto de konvencio aŭ de rekomendo. Projekto de konvencio, post ratifo (konfirmo), fariĝas deviga kontrakto

inter la Ŝtatmembroj de la Konferenco. Rekomendo nur servas por orientiĝi nacian leĝdonon kaj regularon.

Ĉiu Ŝtatmembro devas, en la tempolimo de unu jaro, aŭ escepte 18 monatoj, post la fermo de la kunsido, proponi projektojn de konvencioj kaj rekomendojn al la kompetenta aŭtoritato (tio estas, ĝenerale, la nacia parlamento) por leĝdono aŭ alia ago. Se temas pri projekto de konvencio kaj se la kompetenta aŭtoritato konsentas, la Ŝtat-membro devas ratifi la konvencion.

La Parto XIII finiĝas per deklaro, ke estas metodoj kaj principoj por la reguligo de laborkondiĉoj, kiujn ĉiuj industriaj komunumoj devas peni por apliki, tiom kiom iliaj cirkonstancoj ĝin permesas, kaj ke inter tiuj metodoj kaj principoj la jenaj estas speciale kaj urĝe gravaj :

1. La direktanta principo, ke la laboro ne devas esti konsiderata nur kiel komercaĵo.

2. La rajto je asociado por ĉiuj laŭleĝaj celoj, same por la salajratoj kiel por la dungantoj.

3. La pago al la laboristoj de salajro sufiĉa por certigi konvenan vivnivelon, kiel oni konceptas tion en ilia lando kaj tempo.

4. La akcepto de okhora labortago aŭ 48-hora laborsemajno, kiel normo celota ĉie, kie ĝi ne estas ankoraŭ atingita.

5. La akcepto de semajna ripozo almenaŭ 24-hora, kiu devas laŭeble enteni dimanĉon.

6. La forigo de infanlaboro kaj la difino por la laboro de gejunuloj de la limigoj necesaj por ebligi la daŭrigon de ilia edukado kaj certigi ilian fizikan disvolviĝon.

7. La principo, ke viroj kaj virinoj ricevu egalan salajron por egalvalora laboro.

8. La normo leĝe starigita en ĉiu lando pri laborkondiĉoj devas certigi justan ekonomian traktadon al ĉiuj laboristoj laŭleĝe loĝantaj en la lando.

9. Ĉiu Ŝtato devas organizi inspektan servon, en kiu partoprenas virinoj, por certigi la aplikon de leĝoj kaj reguloj por la protekto de laboristoj.

Al la originaj Membroj de la Organizaĵo la Konferenco, en sia unua kunsido, aldonis Germanujon, kiu daŭre kunlaboras en tiu agadkampo kun la aliaj Membroj de la Ligo de Nacioj.

Dekkvin kunsidoj de la Internacia Labora Konferenco ĝis nun okazis, la unua en Washington en 1919, la dua en Genova en 1920, kaj la ceteraj en Genève de 1921 ĝis 1931. En tiuj kunsidoj, la Konferenco alprenis entute 32 projektojn de konvencioj kaj 38 rekomendojn. Tiuj decidoj ampleksas tre larĝan kampon, pritraktante temojn tiel diversajn kiel la limigo de laborhoroj, la protekto de virinoj kaj infanoj, nokta laboro, semajna tagripozo, senlaboreco, elmigrado, laborinspektado, kompenspago por laborakcidentoj kaj profesiaj malsanoj, antaŭforigo de industriaj venenadoj, sociaj asekuroj kaj teknika instruado.

La ratifado de projektoj de konvencioj[1] ne progresis tiel rapide, kiel oni povus esperi. La ekonomia situacio ĉie, kaj eĉ la politika situacio en multaj landoj, fariĝis malpli favora al socia leĝdonado ol la redaktantoj de la Parto XIII kaj la konferencantoj en Washington antaŭvidis, kaj rezultigis hezitadon, timemon kaj malfidon. Precipe pri la okhora konvencio, kiun oni nomis « la bazo de ĉiu internacia laborleĝdono », la sintenado de la grandaj industriaj Ŝtatoj estas tute komprenebla sed tre malfaciliganta. Tamen, malgraŭ ĉio, multe da ratifoj jam okazis, kaj la influo de la Konferenco sur la socia leĝfaro de la diversaj landoj estas multe pli larĝa kaj profunda, ol oni povas konjekti el la ĝis-nuna konfirmado de konvencioj.

Krom tio, la ĉiujara kunveno de reprezentantoj de registaroj, mastroj kaj laboristoj el tiom da nacioj, por diskuti gravajn sociajn demandojn laŭ tutmonda vidpunkto, estas nova fenomeno, kies alta valoro ne estas dubebla kaj fariĝas pli kaj pli evidenta. Ĉe ĉiu kunsido la Konferenco alprenas pli firme la karakteron de internacia parlamento, de esprimanto kaj formanto de internacia opinio.

La alia konsistaĵo de la daŭra organizaĵo fondita de la Parto XIIIa, la Internacia Labora Oficejo, estas starigita en la sidejo de la Ligo de Nacioj, kiel parto de la organizo de la Ligo. Ĝi estas sub la direkto de la Administra Konsilantaro, konsistanta el 24 personoj, 12 reprezentantaj la registarojn, 6 elektitaj de la mastraj delegitoj kaj 6 de la laboristaj delegitoj al la Konferenco. Ĝiaj funkcioj enhavas la kolekton kaj disdonon de informoj pri ĉiuj temoj rilataj al internacia reguligo de laborkondiĉoj, la ekzamenon de ĉiuj temoj proponitaj por esti prezentataj al la Konferenco, kaj la faradon de ĉiuj enketoj kiujn la Konferenco povas ordoni. Ĝi preparas la tagordon de la Konferenco.

La *Direktoro* de la Oficejo estas Sro. Albert Thomas kaj la Adjunkto-Direktoro Sro. H. B. Butler. La *Kabineto de la Direktoro* preparas la aferojn submetotajn al la Direktoro, transdonas la decidojn de la Direktoro kaj kontrolas ilian aplikon. La Oficejo havas kvar fakojn : la *Diplomata Divizio*, kiu organizas la laboron de la Konferenco kaj sin okupas pri la korespondado kun registaroj rilata al konfirmo de konvencioj kaj aliaj aferoj ; la *Divizio pri Informoj kaj Interrilatoj*, kiu sin okupas pri la kolekto kaj disdono de informoj kaj la interrilatoj kun mastraj, laboristaj kaj aliaj organizaĵoj ; la *Divizio pri Esploradoj*, kiu faras sciencajn esploradojn, kaj la *Administra Divizio*, kiu zorgas pri ĉiuj administraj kaj internaj aferoj, kiel ankaŭ pri la publikaĵoj de la Oficejo.

La Fakoj estas subdividitaj je Sekcioj kaj Servoj, inter kiuj troviĝas teknikaj sekcioj, konsistantaj el spertuloj kiuj sin okupas pri specialaj studoj rilataj al senlaboreco, agrikulturo, industria higieno, sendanĝero, sociaj asekuroj, kooperado kaj aliaj demandoj.

La personaro, kiu estas granda-parte rekrutata per konkurso, konsistas el ĉirkaŭ 400 oficistoj elektitaj el pli ol 30 diversaj nacioj.

La Internacia Labora Oficejo eldonas grandan nombron da publikaĵoj, periodaj kaj aliaj, ĉiuj presitaj en la franca kaj angla lingvoj (la oficialaj lingvoj de la Ligo de Nacioj), kaj multaj ankaŭ en germana kaj aliaj lingvoj. La neperiodaj verkoj konsistigas riĉan kolekton da studoj kaj raportoj pri la plej gravaj ekonomiaj kaj sociaj demandoj, kaj enhavas, inter aliaj aferoj, la rezultatojn de la specialaj enketoj faritaj de la Oficejo laŭ ordono de la Konferenco, kiel, ekzemple, la Enketo pri Produktado. Estas ankaŭ daŭra serio da tekstoj de laborleĝoj. La ĉefaj periodaj eldonaĵoj estas : semajna informilo, monata revuo, kaj kronikoj pri industria higieno kaj sendanĝero kaj industriaj juĝdecidoj.

Inter la konstantaj kaj multformaj aktivecoj de la Internacia Labora Oficejo, oni devas almenaŭ citi la jenajn : ampleksaj esploradoj en diversaj ekonomiaj kaj sociaj kampoj ; kunlaboro kun aliaj gravaj institucioj kaj kun specialaj komisionoj starigitaj laŭ decidoj de la Konferenco aŭ de la Ligo de Nacioj ; klopodoj faritaj por la profito de la rifuĝintoj ; ĉiom pligrandiĝanta rolo ludata kiel

[1] Vidu la liston de la konvencioj kaj de la landoj kiuj ratifis ilin ĉe la fino de tiu-ĉi numero.

organo por alcentrigi kaj disdoni ĉiuspecajn informojn pri laborkondiĉoj, kiel la fonto, al kiu pli kaj pli sin turnas registaroj, mastraj kaj laboristaj organizaĵoj kaj ĉiuj asocioj kaj individuoj dezirantaj sin sciigi pri leĝoj, regularoj, interkonsentoj, kutimoj, praktikoj kaj okazintaĵoj interesantaj la laboristaron en ĉiuj regionoj de la mondo.

Ĉi-tiu mallonga listo sufiĉas por montri ke la Internacia Labora Oficejo, same kiel la Konferenco, tute pravigis ĝian starigon kaj fariĝis institucio de nediskutebla utileco por la disvastigo de socia scienco kaj la realigo de socia justeco kaj universala paco.

# La Altaj Oficistoj de la Internacia Laboroficejo



S-ro. Albert THOMAS
Direktoro



S-ro. H. B. BUTLER
Adjunkto-Direktoro

ALBERT THOMAS, Direktoro de la Internacia Laboroficejo, Franco. Naskiĝis en 1878. Ano de franca Supera Normala Lernejo, fariĝis universitata agregaciulo en 1902. Antaŭa redaktoro de la socialista gazeto « Humanité », fondinto de la « Revue syndicale » en 1904, fariĝis deputito ĉe la franca parlamento en 1910. Reelektita en 1914, li fariĝis ministro de Armadoj en 1916, dum la milito. Post la milito, en 1919, li estis elektita kiel Direktoro de la Internacia Laboroficejo.

H. B. BUTLER, adjunkto-direktoro de la Internacia Laboroficejo. Anglo. Naskiĝis en 1883. Estis Sekretario ĉe la *Foreign Office* en 1916, fariĝis Unua asistanta Sekretario ĉe la Labora Ministerio en 1919, kaj adjunkta ĝenerala sekretario de la Komisiono pri Laboro ĉe la Packonferenco de 1919. Estis elektita adjunkto-Direktoro de la Internacia Laboroficejo en 1920.

## KABINETO DE LA DIREKTORO :

Ĉefo de la Kabineto : S-ro M. VIPLE

Adjunkto-ĉefo : S-ro H. GALLOIS

## DIVIZIAJ ĈEFOJ :

S-ro G. E. DI PALMA CASTIGLIONE, ĉefo de la Divizio pri Informoj kaj Interrilatoj. Italo.

∴

S-ro E. J. PHELAN, ĉefo de la Diplomata Divizio, Irlandano.

F. MAURETTE, ĉefo de la Divizio pri Scienca Explorado. Franco.

∴

S-ro E. RITTER, ĉefo de la Administra Divisio. Germano.

# LISTO DE LA KONVENCIOJ ĜIS NUN ALPRENITAJ KAJ DE LA ŜTATOJ KIUJ RATIFIS ILIN

| Kunsidoj | Konvencioj pri : | Ŝtatoj ratifintaj | Nombro |
|---|---|---|---|
| 1919 | 1. Limigo de laborhoroj en industriaj entreprenoj al 8 tage kaj 48 semajne. | Aŭstrujo[1], Belgujo, Bulgarujo, Ĉilo, Ĉeĥoslovakio, Francio[1], Greklando, Hindujo, Hispanujo, Italujo[1], Latvolando[1], Litovujo, Luksemburgo, Portugalujo, Rumanujo | 15 |
| 1919 | 2. Senlaboreco. | Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Danlando, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Greklando, Hindujo, Hispanujo, Hungarujo, Irlandujo, Italujo, Japanlando, Jugoslavujo, Luksemburgo, Norveglando, Pollando, Rumanujo, Sud afriko, Svedlando, Svislando | 24 |
| 1919 | 3. Laboro de virinoj antaŭ kaj post akuŝo. | Bulgarujo, Ĉilo, Germanujo, Greklando, Hispanujo, Hungarujo, Jugoslavujo, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Rumanujo | 11 |
| 1919 | 4. Nokta laboro de virinoj. | Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Ĉilo, Estonujo, Francujo, Granda-Britujo, Greklando, Hindujo, Hungarujo, Irlandujo, Italujo, Jugoslavujo, Kubo, Lituanujo, Luksemburgo, Nederlando, Rumanujo, Sudafriko, Svislando | 21 |
| 1919 | 5. Minimuma aĝo por allasi infanojn al industria laboro. | Belgujo, Bulgarujo, Ĉilo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Estonujo, Granda-Britujo, Greklando, Irlandujo, Japanujo, Jugoslavujo, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Nederlando, Pollando, Rumanujo, Svislando | 18 |
| 1919 | 6. Nokta laboro de gejunuloj en industrio. | Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉilo, Danlando, Estonujo, Francujo, Britujo, Greklando, Hindujo, Hungarujo, Irlandujo, Italujo, Jugoslavujo, Kubo, Latvolando, Litovujo, Luksemburgo, Nederlando, Pollando, Rumanujo, Svislando | 22 |
| 1919 | 7. Uzo de blanka fosforo en la fabrikado de alumetoj[2]. | La jenaj Ŝtatoj aliĝis al la Berna Konvencio antaŭ la kunsido de la Konferenco : Danlando, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Italujo, Kanado, Luksemburgo, Nederlando, Norveglando, Sudafriko, Hispanujo, Svislando. La jenaj aliĝis post la kunsido : Aŭstralujo, Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Ĉinlando, Estonujo, Finnlando, Hindujo, Hungarujo, Japanlando, Jugoslavujo, Pollando, Rumanujo, Svedlando | — |
| 1920 | 8. Minimuma aĝo por allasi infanojn al mara laboro. | Belgujo, Bulgarujo, Danlando, Estonujo, Finnlando, Germanujo, Granda-Britujo, Greklando, Hispanujo, Hungarujo, Irlandujo, Japanujo, Jugoslavujo, Kanado, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Pollando, Rumanujo, Svedlando | 22 |
| 1920 | 9. Kompenspago por senlaboreco okaze de ŝipopereo. | Belgujo, Bulgarujo, Estonujo, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Grekujo, Hispanujo, Irlandujo, Italujo, Jugoslavujo, Kanado, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Pollando, Rumanujo | 17 |
| 1920 | 10. Dungigo de maristoj. | Aŭstralujo, Belgujo, Bulgarujo, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Greklando, Hispanujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavujo, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Norveglando, Pollando, Rumanujo, Svedlando | 19 |
| 1921 | 11. Aĝo por allasi infanojn al laboro en agrikulturo. | Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Estonujo, Hungarujo, Irlandujo, Italujo, Japanlando, Luksemburgo, Pollando, Rumanujo, Svedlando | 13 |
| 1921 | 12. Rajto de asociado de agrikulturaj laboristoj. | Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉilo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Hindujo, Irlandujo, Italujo, Jugoslavujo, Latvolando, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Pollando, Rumanujo, Svedlando | 22 |
| 1921 | 13. Kompenso por laborakcidentoj en agrikulturo. | Bulgarujo, Ĉilo, Danlando, Estonujo, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Hispanujo, Irlandujo, Italujo, Latvolando, Luksemburgo, Nederlando, Pollando, Svedlando | 15 |
| 1921 | 14. Uzo de plumboblanko ĉe pentrado. | Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉilo, Ĉeĥoslovakujo, Estonujo, Finnlando, Francujo, Grekujo, Hispanujo, Hungarujo[1], Jugoslavujo, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Norvegujo, Pollando, Rumanujo, Svedlando | 19 |
| 1921 | 15. Semajna ripozo en industriaj entreprenoj. | Belgujo, Bulgarujo, Ĉilo, Ĉeĥoslovakujo, Estonujo, Finnlando, Francujo, Grekujo, Hindujo, Hispanujo, Irlandujo, Italujo, Jugoslavujo, Latvolando, Litovujo, Luksemburgo, Pollando, Portugalujo, Rumanujo | 19 |
| 1921 | 16. Minimuma aĝo por allasi junulojn al laboro kiel hejtistoj kaj karbordigistoj. | Belgujo, Bulgarujo, Danlando, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Grekujo, Hindujo, Hispanujo, Hungarujo, Irlandujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavujo, Kanado, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Norvegujo, Nederlando, Pollando, Rumanujo, Svedlando | 25 |
| 1921 | 17. Deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj okupataj surŝipe. | Belgujo, Bulgarujo, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Grekujo, Hindujo, Hispanujo, Hungarujo, Irlandujo, Italujo, Japanlando, Jugoslavujo, Kanado, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Nederlando, Pollando, Rumanujo, Svedlando | 23 |
| 1925 | 18. Kompenspago por laborakcidentoj. | Belgujo, Bulgarujo, Ĉilo, Hispanujo, Hungarujo, Jugoslavujo, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Nederlando, Portugalujo, Svedujo | 12 |
| 1925. | 19. Kompenspago pro profesiaj malsanoj. | Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Hindujo, Hungarujo, Irlandujo, Japanlando, Jugoslavujo, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Portugalujo, Svedujo, Svislando | 20 |

[1] Kondiĉa ratifo. [2] Konvencio adoptita en Bern en 1906, al kiu l Konferenco rekomendis,ke ĉiuj Ŝtatmembroj de la Organizajo aliĝu.

*(Sekvota)*

L'IMPRIMEUR-GÉRANT : A. GRANCHAMP, 2, RUE DES USINES, ANNEMASSE -871-12-31